



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 10-a de Oktobro 2016

**Ĉeestantoj:** Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi.

*Protokolo de la antaŭa kunsido (5-a de Septembro 2016) – Rimarko de Ŝlomo: ni devas aldoni al tiu ĉi protokolo la detalajn regulojn de la elspezoj. Ŝlomo verkis ilin hebree, Jehoŝua tradukos en E-on. (Decidita jam la duan fojon!)*

### **1. La 18-a Israela Kongreso, 2017** (Amri)

a) La loko: Aŝkelon. La dato: 30.3-1/04, antaŭkongreso en la sudo 26-30/03. (Ne kiel kutime post la IK, pro la ĝojaj eventoj en la Esperanta familio Wandel)

b) La kongresejo: hotelo Leonardo (kvar-stela), ne ekzistas en la urbo junulara gastejo aŭ malpli kosta loko.

c) Nava akiris grupan oferton de 380 sikloj kun matenmanĝoj, inkl VAT.

ĉ) Amri rezervis 11 ĉambrojn per Booking.com pli malmultekoste, je la prezo de 330 NIS/persono/nokto, sen manĝoj, inkl. VAT (280 sikloj – sen la aldona imposto, por eksterlandanoj)

d) Vespermanĝo por loĝantoj 90 NIS, por ne loĝanto 120 NIS, +VAT.

e) La salono kostas 2500 NIS por la tuta semajnfino, - aŭ 25 NIS po persono inkl. kafo/teo/akvo/suko. *Decido: ni uzos la personan eblecon, kio ŝparos por ni (laŭ 30-40 personoj).*

f) Ebleco: nur vendreda vespermanĝo. Ĉiuj ceteraj manĝoj, inkl. matenmanĝojn ekstere (piknike en la apuda parko aŭ plaĝa kiosko/restoracio).

g) ELI invitas por la jaŭda vespermanĝo – por ke venu pliaj homoj, kaj por ke ni gardu la financon balancon.

ĝ) Ŝlomo proponas doni ian rabaton el la kaso al malnovaj, konstante pagantaj ELI-anoj

h) Asorti (el Litovio) petas koncerti (3 homoj, aŭ nur unu), kontraŭ flugo (140 eŭro) kaj loĝado. Diskuto: Ĉu peti kaj preferi Jomo? Ĉu akcepti la triopon de Asorti, aŭ nur la filon Edgar? *Voĉdono: Asorti – 4 (nur unu), Jomo – 2. Decido: ni invitos Edgar. Propono de Gabi: ĉu ELI povas pagi la kostojn de la invititoj, kaj ne dividi inter la partoprenantoj – anstataŭ la vespermanĝo? [poste Nava Bilicki rekomendis same, ke ELI pagu la programkoston, tiel ke ni neniom kolektu de la partoprenantoj surloke. Amri subtenas].*

ĥ) Eblaj eksterlandanoj: usona bahaa Familio (3 personoj), 2 ĉeĥinoj, kiuj povas nur ĝis la fino de marso, Asorti (3 aŭ 1), eble unu polino el Nederlando, unu konatulino de Matilda, polino de Nederlando – ŝi ekigos kontakton al Amri por informoj –, kaj eble Martha Otto, la bahaino.

i) ELI aperigu anoncon aperos en la novembra n-ro de E-o, ankaŭ pri la Memorlibro kaj la KD. (*akceptita*)

2/...



## **2. Financoj** (Ŝlomo)

- a) Diversaj: Ŝlomo informiĝis pri prunto, cele al aĉeto de oficejo. La banko ne donas prunton al asocioj. Ŝlomo klopodos ricevi konfirmleteron pri tio de la banko, por ke ni povu prezenti ĝin al la Administranto de la Societoj (“Rašam ha-Amutot”). Li ankoraŭ ne reagis al la peto de ELI: akcepti estraranon por pritrakti la bilancajn problemojn. Samtempe ni devos interesiĝi ĉe aliaj bankoj pri ebla prunto.
- b) Kelkaj estraranoj transdonis siajn vojaĝelspezojn al la kasisto, kaj ricevis la kompencon. Ĉiuj estas petataj fari tion.

## **3. Memorlibro pri Josi** (Amri)

- a) Dua eldono - Eldad kaj Gabi provlegas, Amri korektas grafike. Laŭnencese Doron reskanos la malpli klarajn paĝojn de IE kaj dokumentoj.
- b) Kiel decidite, 100 ekzempleroj laŭ 50 NIS/ekz. (5000 sikloj). Celdato: decembro.
- c) Amri korespondis kun Ulrich Lins pri recenzo en Revuo E-o – li akceptis recenzi.
- d) Anonco aperos en la novembra n-ro de E-o (ankaŭ pri la nova KD kaj nia 18-a IK)

## **4. Dratverejo** (Jehoŝua)

La kontrakto estis subskribita je la 22-a de septembro. Unu monato estis pagita kontante (2800 NIS), pliaj 19 ĉekoj nun transdonitaj al Ŝlomo, du garanti-ĉekoj po 13000 NIS. La vidvino devas foriri ĝis la fino de oktobro, kaj lasi la murojn de la loĝejo blanke kalk-farbitaj. La novaj loĝantoj devus eniri la 1-an de novembro. Ili petis, ke ni instalu vitrojn sur la balkono. Jehoŝua intencis proponi duonigi la elspezojn, sed neantendite oni informis ke la tuta domo eniris projekton de rekonstruado “פינוי בינוי”, 80% de la posedantoj devas subskribi, por ke la projekto komenciĝu. La loĝantoj ne pagos iom ajn, je la fino de la projekto oni ricevos pli grandan apartamenton plus magazenon sube. Ni devos sciigi la novajn luantojn pri la novaĵoj, kaj agi konforme.

## **5. ELI-retejo** (Dror)

- a) Statistika mezurilo - forgesiĝis la pasvorto, (estis ĉe Tsvi, troviĝas en la malnova komputilo de Amri) - necesas reakiri.
- b) Oni devas rekonstrui la strukturon, kaj laŭ ĝi revizii la menuon
- c. Provlegado de la anoncoj por eviti erarojn – estas tro multaj. Gabi volontiĝas – sed estas teknika problemo, ĉar Dror skribas rekte en HTML-kodoj. Decidite ke Dror sendos al Gabi la tekston en Word, por lingve kontroli antaŭ ol aŭfiŝi.



## **6. La Eta Princo**

Propono de Oded estis: Ekzistas iu brokanta librovendejo en Tel Avivo, kie estas eksponita tiu libro en pluraj lingvoj. Oded proponis starigi tie ankaŭ la E-lingvan tradukon. ELI havas (en la kelo de Doron) unu ekzempleron. Matilda: tiu ekzemplero estas pli valora, ĉar la antaŭa eldono elĉerpiĝis delonge. La libro lastatempe estis denove eldonita. Decido: Ni mendos 3 ekzemplerojn de UEA, kaj vendos en tiu vendejo. Amri kontaktos la Libroservon de UEA en tiu afero.

**La venonta kunsido:** lunde, la 7-an de Novembro 2016, je 19:30 (?)

Protokolis: Gabi Zeevi